
N° 02
1968

G.L. GIMELLI

# ITALA fervojisto

Organo
Associazione
Italiana
Ferrovieri
Esperantisti



IFEA

## APPELLO DEL CASSIERE

Si pregano di nuovo vivamente i Soci che non hanno ancora pagato le quote sociali, e continuano a ricevere il presente bollettino, di inviare con urgenza le quote per l'anno 1967, da noi già versate alle Associazioni di cui siamo aderenti; oppure trasmettere le loro dimissioni per non far pagare, anche per il 1968, le loro adesioni alle suddette Associazioni.

Per agevolare il versamento delle quote sociali si allega il bollettino di versamento nel C.C.P.nº8/24094 intestato all' IFEA, Via Donato Creti, 61 I-40128 Bologna.

## 20-a JUBILEA KONGRESO DE LA INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO "I.F.E.F." 11 ĝis 17 de majo 1968-a en VARNA (Bulgario)

KONGRESA PROGRAMO

Sabato la 11-a de majo: 8,00 Kongresejo malfermita. 13,30 Kunveno LKK-IFEF-estraro. 15,30 Kunveno IFEF-estraro. 20,00 Interkona Vespero.
Dimanĉo la 12-a de majo: 10,00 Solena malfermo de la kongreso. 15,00 Por junulara renkontiĝo. 17,00 Bankedo. 20,00 Distra vespero; varia programo.
Lundo la 13-a de majo: 9,00 Kunsido IFEF-estraro - Komitato. 10,00 Vizitoj en la urbo Varna. 14,30 Unua kunveno de IPEA. 14,30 Kunsido de Fakprelega Komisiono. 16,00 Kunsido de Terminara Komisiono. 16,00 Kunveno Junularo. 20,00 Prezentadoj de la Bulgara Esperanto Teatro.
Mardo la 14-a de majo: 9,30 Plenkunsido. 15,30 Fakprelego kun filmprezentado. 20,00 Folklora vespero.
Merkredo la 15-a de majo: 8,00 Tuttaga ekskurso al rivero Kamĉija-Nesebâr-ripozkomplekso "Slâĉev brjag" (Suna bordo).
Ĵaŭdo la 16-a de majo: 9,00 Dua kunsido Estraro Komitato. 9,00 Dua kunveno de IPEA. 10,00 Futbalmatĉo. 15,30 Eventuale dua fakprelego. 17,00 Akcepto ĉe la Prezidanto de la Urba Popola Konsilantaro Varna. 20,00 Kongresa balo.
Vendredo la 17-a de majo: 8,30 Duontaga ekskurso al urbo Balĉik. 15,00 Dua plenkunsido; fermo de la kongreso.

## 53-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO. MADRID, 3-10 aŭgusto 1968-a

Alta Protektanto: Ĉef-Generalo Francisco Franco, Ŝtatestro de Hispanujo.
Konstanta Adreso: Nieuwe Binnenweg, 176, Rotterdam-2 (Nederlando).

OFICIALA KOMUNIKO

Dua Bulteno: Ekde februaro ĉiu aliĝinto ricevas la Duan Oficialan Bultenon. En ĝi troviĝas, krom ĝeneralaj informoj pri la Kongreso, la mendiloj por loĝado, ekskursoj, bankedo, k.t.p. La Loka Kongresa Komitato povas plenumi la mendojn de la Kongresanoj nur se tiuj estas faritaj pere de la mendiloj troviĝantaj en la Dua Bulteno.

Limdato: Ni atentigas ke la lasta limdato por aliĝo al la Universala Kongreso estas la 25-a de junio 1968. Post tiu dato aliĝoj ne plu estas traktitaj kaj la aliĝkotizoj restos je dispono de la pagintoj. En esceptaj kazoj LKK rajtas akcepti aliĝojn dum la kongresa semajno, sed tiam la aliĝanto devas krompagi la sumon de 25 ned.gld., sendepende de la kotiza kategorio. Por aliĝantoj dum la Kongreso LKK ne certigas la liveron de la dokumentoj.

Fervoja Rabato: Kun la dua bulteno estas sendita al ĉiuj aliĝintoj en Eŭropo speciala karto, per kiu ili ricevas la rajton ĝui 25%-an rabaton je aĉeto de fervoja revenbileto al Madrid. La karto estas akompanata de detalaj klarigoj pri ĝia uzo.

Foto-Konkurso: La limdato por la sendo de konkursaĵoj estas fiksita je la 1-a de julio 1968.

Statistiko: Je 20-2-1968 la nombro estis entute 913 aliĝintoj el 35 landoj.

G.G.Pompilio, Konstanta Kongresa Sekretario

ANONCETOJ

- Mi serĉas poŝtmarkojn (novajn/uzitajn), kaj oficialajn poŝtstampojn pri esperantistaj temoj. Skribu por interkonsento precizigante postulitan kompencon al: S-ro Antonio De Salvo, Via Montesilvano, 15 - I-00156 ROMA.
- Deziras korespondi: S-ino Nina MEDEMOVA, Str."Oktomvrijska"50 Vh."B" Ap.6 Gabrovo (Bulgaria), la nevo 14-jara Plamen Dimitrov Dimitrov, Str."P.Karavelov"2 Gabrovo kaj S-ro Ivan Tonkin, Str.Oktomvrijska" 50 B ap.6 Gabrovo.

## JARKUNVENO DE JUGOSLAVIA ASOCIO DE FERVOJISTOJ ESPERANTISTOJ

Ĉijare la jarkunveno de J.A.F.E. okazos en Pohorje apud Maribor, la 13-an kaj 14-an de aprilo 1968-a. Samtempe la Fervojista Esperanto Societo Maribor festas la 10-jaran Jubileon de ĝia fondiĝo. Al menciita aranĝo ni invitas ankaŭ reprezentantojn de fervojistaj esperantaj organizoj el najbaraj landoj. Nia deziro estas ke nian aranĝon partoprenu ankaŭ reprezentantoj de I.F.E.A.

Jarkunveno kaj aranĝo okazos sur Monto Pohorje kiu estas ĉiam inda por vizito. Partopreno de viaj esperantistoj profundiĝos la rilatojn en nia fervojista sfero. Pri via decido bonvolu informi nin plej baldaŭe!

Sekretario: M. Maraŝeviĉ Prezidanto: J. Mirkoviĉ

## "M I E L A L U N O E N R I M I N I"

### Konkurso por junaj geedzaj paroj

1) La Aŭtonoma Entrepreno de Restado kaj la Asocio Hotelestroj de Rimini organizas konkurson "miela luno en Rimini" kiun rajtos partopreni ĉiuj junaj geedzaj paroj kiuj geedziĝis post la unua de januaro 1966 kaj ne atingos la 35-an jaraĝon je la 20-a de majo 1968.
2) La konkursantoj, plej malfrue ĝis la lasta tagdeko de la venonta aprilo, devos sendi en du tajpitaj kopioj la rakonton de sia amhistorio travivita por atingi sian sonĝon. La amrakonto estu koncize kaj esperantlingve skribita. Almenaŭ unu el la geedza paro estu bona esperantisto.
3) Tiucela komisiono plenrajte juĝos kaj premios tiujn rakontojn kies protagonistoj travivis homan situacion aparte rimarkindan pro boneco, pureco, sindonemo, nobleco de sentoj kaj fido je tiuj moralaj valoroj ofte miskonataj en ĉi tiu nia epoko.
4) La premioj konsistos en 10-tagaj senpagaj restadoj en bonaj hoteloj de la Marbordo de Rimini. Dum la restado oni aranĝos apartajn festojn, ekskursojn kaj regalojn honore al la paroj La restadperiodo estas fiksita per la lasta tagdeko de majo 1968.
5) Oni adresu ĉion al: p.Albino Ciccanti - S.Bernardino,26 -47037 RIMINI(It.)

**Katolika festo en Romo:** LA SERMONO DE LA NACIOJ

Esperanto estis plurfoje utiligata en la katolika festo "La Sermono de la Nacioj", kiu okazis pasintjanuare en la preĝejo S.Andrea della Valle en Romo, kaj dum kiu geknabetoj el 27 landoj prezentis programon en siaj respektivaj lingvoj. Tridek knabinoj de la mezgrada lernejo "Col di Lana", sub la gvidado de Prof-ino A.Antonelli Kohler, prezentis du kristnaskajn kantojn kaj lulkanton de Brahms en Esperanto.

## MIGRANTA ESPERANTO-EKSPOZICIO EN VIENO

Aŭstria Fervojista Esperantista Federacio inaŭguris la 1-an de marto, en la granda halo de la Suda stacidomo en Vieno, migrantan ekspozicion, kiu konsistas el 18 tabuloj. Post kelka tempo la ekspozicio migros al Viena Okcidenta Stacidomo, Linz, Salzburg, Innsbruck, Klagenfurt kaj Graz.

## 46-a GERMANA ESPERANTO KONGRESO
## PENTEKOSTON 1968-a EN MUNKENO

De la 31-a de majo ĝis la 3-a de junio 1968 la bavara ĉefurbo gastigos la 46-an Germanan Esperanto-Kongreson. Por eksterlandanoj la partopreno estas senkosta; tamen necesas plenigo de aliĝilo, kiun oni petu al LKK (Horst Spirat, D-8 München 25, Postfach 546). La programo enhavas i.a. gvidon tra la urbo, laborkunsidojn, prelegojn, podian diskutadon, balon, vesperon kun bavara folkloro kaj ekskursojn. Postkongresa ekskurso tritaga kondukos ĝis Salzburg (Aŭstrio); prezo por veturo kaj tranoktado 70 GM. Apartaj programeroj okazos por infanoj.

VICKANCELIERO DE FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANIO WILLY BRANDT sciigis al la Prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, D-ro Umberto STOPPOLONI, ke li "ja scias apreci la popolligajn klopodojn de ĉiuj adeptoj de Esperanto kaj deziras al ilia agado ankaŭ estontе sukceson".

La Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Str. Levski 1 Sofio (Bulgario) eldonis en Novembro 1967-a esperantlingvan broŝuron pri Raporto kaj ferma parolado al "Naŭa Kongreso de la Bulgara Komunista Partio" de Todor Ĵivkov.

## N E K R O L O G O

Laste atingis nin la funebra sciigo pri la morto de nia membro:
D-ro Carlo BORIONE en la aĝo de 82-jaroj, okazinta en Torino la 18-an de januaro 1968-a. Li estis fondinto de nia Fervojista Asocio, longjare ties estrarano kaj estrarano de Itala Esperanto-Federacio. Tiu forta bato kiu trafis nian Asocion ne havas konsolon. Lia boneco kaj grandanimo estas tre konataj ĉe ĉiuj Esperantistoj. Dum longaj jaroj la nomo de D-ro Borione reprezentis la fervojistan kaj ĝeneralan movadon en Italio.
Ke li ripozu en paco! Lian karan memoron ni konservos amike en nia koro!
Al familianoj, la varmajn kondolencojn de I.F.E.A.!

## N I L E G I S

VICHY - Esperantlingva faldfolio kun koloraj fotoj de la famkonata baneja franca urbo Vichy. Krom siaj bonfaraĵoj konataj de la tuta mondo, pri kuracado, Vichy estas restad-urbo kiu prezentas la du plej belajn floraĵojn de la ferioj: sanon kaj plezurojn. Mendu la faldfolion ĉe: Office de Tourisme et Thermalisme, 19 rue du Parc - VICHY Francio.
VOJAĜI TRA HISPANIO ESTAS FACILE - Interesa esperantlingva broŝuro eldonita de RENFE (Nacia Reto de Hispanaj Fervojoj). La 40-a paĝa eleganta verdkolora broŝuro kun fotoj kaj koloraj bildoj enhavas ĉiujn instrukciojn kaj konsilojn por vojaĝi fervoje tra Hispanio. Plie la broŝuro, kun mapoj kaj trafaj ilustraĵoj, reklamas ĉiujn allogaĵojn de Hispanio, kiuj povos altiri la turistojn.
FAKTOJ PRI SVEDUJO - Esperantlingva faldfolio eldonita en Januaro 1967-a de la Sveda Instituto por kultura interŝanĝo kun eksterlando. Ĝi enhavas la fundamentajn informojn pri Svedujo. Petu la faldfolion ĉe: Sveda Instituto, Kungsgatan 42, Stockholm C. Svedujo.
IMPULS-OFICIALA ORGANO DE B.E.J.O. "Brazila Esperantista Junulara Organizo" 1-a Jaro N°1 Oktobro-Novembro-Decembro 1967-a. Presita esperantlingva belaspekta revuo. Ĝia interesa enhavo igas tiun novan trimonatan gazeton tre leginda. Korajn gratulojn al junaj Brazilaj geesperantistoj!
TAMEN-TRIMONATA ORGANO DE BEFA "Belga Esperanto Fervojista Asocio"- Centra Stacio-Bruselo. N-ro 1 Januaro-Februaro-Marto 1968-a. Belga filio de Internacia Fervojista Esperanto Federacio "IFEF"- Membro de la Nacia kaj Internacia Federacio por arta kaj Intelekta Distro de Fervojistaro "FISAIC". Nova serio de la Bulteno de niaj Belgaj kolegoj. Korajn gratulojn al ili!
KATALOGO PRI ESPERANTO-POŜTMARKOJ de Vàňa Vladimir. Eldono: Esperantaĵojn kolektanta Internacia Klubo "E.K.I.K.". Interesa dudekpaĝa katalogo pri ĉiu Esperanto-poŝtmarko kun ĝiaj bildoj. Bona helpilo por ĉiuj kolektantoj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj serĉas dokumentojn pri la oficialigo de Esperanto. Mendebla ĉe Anna-Greta Strönne, Amiraslgatan 36, Malmö, Svedujo. Prezo: 6,50 Svedaj kronoj.
MONDMAPO KUN ĈIUJ NOMOJ EN ESPERANTO - Okjara laboro de la Internacia Komisiono por Ordigo de Geografiaj Nomoj. Grandeco de la mapo: 100x70 cm. Preso en 13 koloroj, sur bonkvalita papero. Dorsflanke: Deklaro de la Komisiono kaj listo de la nomoj de fizika kaj politika geografio. Prezo: 1 dolaro aŭ egalvaloro. Mendu ĉe I.O.E. Zetska 4 A Beograd (Jugoslavio).

## ESPERANTO EN LA RADIO

RADIO ROMA-ESPERANTO. Casella Postale 320 Roma, Italia. Ĉiudimanĉe de h.21 ĝis 21,20 (M.E.T.).Ondlongoj m.25,42-30,90-41,24. Redaktoro:Luigi MINNAJA.
MAJO 1968-a: 2151 la 5-an: Tra la literaturo. 2152 la 12-an: Novaĵoj el Italujo. 2153 la 19-an: Italaj kanzonoj en Esperanto. 2154 la 26-an: Leterkesto.
JUNIO 1968-a: 2155 la 2-an: La itala poeto Giuseppe Ungaretti. 2156 la 9-an: La urbo Cefalù kaj ĝia normanda katedralo. 2157 la 16-an: La itala komponisto Ildeorando Pizzetti. 2158 la 23-an: La mirindaj grotoj de Castellana. 2159 la 30-an: Kristana mondo.

## INTERNACIA LITERATURA PREMIO AL ITALA ESPERANTISTINO

TORINO: Per la rakonto "Avinjo" profesorino Clelia Conterno Guglielminetti gajnis ĉijare la internacian premion "Comella Bassols" por la plej gaja rakonto, originale verkita en Esperanto.

Azienda Autonoma di Soggiorno

Centro Esperantista RIMINI

# " M I E L A  L U N O  E N  R I M I N I "

## Konkurso por junaj geedzaj paroj

---

1) La Aŭtonoma Entrepreno de Restado kaj la Asocio Hotelestroj de Rimini organizas konkurson "miela luno en Rimini" kiun rajtos partopreni ĉiuj junaj geedzaj paroj kiuj geedziĝis post la unua de januaro 1966 kaj ne atingos la 35-an jaraĝon je la 20-a de majo 1968.

2) La konkursantoj, plej malfrue ĝis la lasta tagdeko de la venonta aprilo, devos sendi en du tajpitaj kopioj la rakonton de sia amhistorio travivita por atingi sian sonĝon.
La amrakonto estu koncize kaj esperantlingve skribita.
Almenaŭ unu el la geedza paro estu bona esperantisto.

3) Tiucela komisiono plenrajte juĝos kaj premios tiujn rakontojn kies protagonistoj travivis homan situacion aparte rimarkindan pro boneco, pureco, sindonemo, nobleco de sentoj kaj fido je tiuj moralaj valoroj ofte miskonataj en ĉi tiu nia epoko.

4) La premioj konsistos en 10-tagaj senpagaj restadoj en bonaj hoteloj de la Marbordo de Rimini.
Dum la restado oni aranĝos apartajn festojn, ekskursojn kaj regalojn honore al la paroj.
La restadperiodo estas fiksita por la lasta tagdeko de majo 1968.

5) Oni adresu ĉion al: p. Albino Ciccanti - S.Bernardino,26 47037 RIMINI (Italujo).

---

- Atentigo por la Esperanto-gazetoj kaj radioj:
  - bv. diskonigi la konkurson kiel eble plej baldaŭ.
  - ne forgesu sendi al supra adreso unu aŭ du ekzemplerojn de la gazeto kun la presita konkurso.
  - oni informu nin pri la okazinta radiodissendo rilate la konkurson.
  - oni aldonas fotojn petante ke oni ilin publikigu.
  - kompreneble ni repre devos pruvi al la koncernaj instancoj per trafaj dokumentoj pri nia serioza laboro.

---